

## NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo  
San Alejandro 6-4<sup>o</sup>B-EXT. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras Lupe Sanz

**JUNIO 2009**

### “NIA VOĈO” SERĈAS NOVAN REDAKTORON

Lupe, kiel ŝi anoncis en la lasta Ĝenerala Kunsido de MEL, kaj post 25 jaroj kiel redaktorino de “Nia Voĉo”, ne deziras daŭrigi la laboron.

Plenumi du paĝojn de la flugfolio estas facile, sed oni bezonas konstantan laboron por fari ĝin monate: kolekti esperantajn novaĵojn pri Hispanio kaj eksterlande, sendi per elektronika poŝto aŭ per normala poŝto al membroj de MEL kaj aliaj interesitoj, ktp. Ĉu iu el vi estas preta por fari ĝin?

### EN HISPANIO

Rafael Mateos (**Huelva**) prelegos en julio pri “Esperanto per pacemigaj ludoj” en la Kastelo Gresillon (Francio) dum la semajno “Paco kaj Esperanto”

**Mallorca.** Inter la 9 kaj la 15 de julio okazos 20 hora universitata kurso (kun liberaj kreditoj) pri socilingvistiko, artefaritaj lingvoj, historio de la movado specife majorka kaj baza esperanta kurso. Intervenos profesoroj de la universitatoj Baleara, Pompeu Fabra kaj Oviedo. Dum la XI Festivalo de Poezio de la Mediteraneo, okazonta la venontan 4an junio en Palma de Mallorca, partoprenos, reprezentante la esperantan lingvon, Abel Montagut.

Okaze de la Tago de la Libro, en la retpaĝo de la biblioteko de la IES Mar de Alborán (**Estepona**), Alejandro kaj Mari Fran legis esperante la unuan paragrafon de la fama libro La inĝenia hidalgo don Quijote de la Mancha.

Pasintan 30an Aprilo, en Saló de Cròniques de la **barcelona** urbodomo okazis solenaĵo memore al la Universala Kongreso de 1909 kaj vizito de D-ro Zamenhof al la urbo. Partoprenis KEA, HEF (Pedro Hernández). La grupo Kaj Tiel Plu kantis en la balo okazinta en placo del Rei. Ankaŭ okazis promenado tra malnova Barcelono dum kiu fakulo rakontis kia estis la vivo en 1909, klarigis pri la tiama UK, pri la Tragika Semajno kaj rakontis kuriozajn historiajn anekdotojn pri la urbo, okazis veturado ĝis la tombejo de Montjuïc, kaj flora oferdono en la tombo de Francesc Ferrer i Guàrdia, vizito al Fossar de la Pedrera kaj klarigo pri la historio de la ĉ. 4000 entombigoj tie (internaciaj brigadistoj kaj persekutitoj de la diktaturo).

### ESPERANTA MONDO

La novelaro, “**Marvirinstrato**”, estas senpage elŝutebla. [http://timwestover.com/marvirinstrato/?page\\_id=7](http://timwestover.com/marvirinstrato/?page_id=7). Tri el la dek ok noveloj en la novelaro ricevis premiojn en la branĉo "Prozo" de la Belartaj Konkursoj de UEA

42 landoj partoprenis la pasintan eŭropan kanzonkonkurson nomatan "**Eurovision**". Unu kantistino, Patricia Kaas, el Francio, kantanta en la franca, ne nur kontraŭstaras la tendencon kanti en la angla lingvo, sed ŝi metis Esperantan tekston de sia kanzono en sian retpaĝaron.

Rekomendataj **Landnomoj** estis aprobitaj de la Akademio en Marto 2009. La dokumento en formato pdf estas trovebla ĉe: [http://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo\\_de\\_rekomendataj\\_landnomoj/Oficialaj\\_Informoj\\_de\\_AdE\\_-\\_numero\\_12\\_2009\\_-\\_Listo\\_de\\_Rekomendataj\\_Landnomoj.pdf](http://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo_de_rekomendataj_landnomoj/Oficialaj_Informoj_de_AdE_-_numero_12_2009_-_Listo_de_Rekomendataj_Landnomoj.pdf)

Nova aliĝsistemo de **Pasporta Servo**: <http://www.pasportaservo.org>

Nova reta **sciencia revuo** en Esperanto elŝuteblas el jena adreso:  
<http://www.teleskopo.com/unuaeldono.htm>

### **ĈIUJ AL MALAGO: NE RESTU HEJME**

2-a ĝis 5-a de julio 68<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto kaj 14<sup>a</sup> Andaluzia Kongreso de Esperanto. Malago. [www.esperanto.es/](http://www.esperanto.es/)

Ĉu vi estas unu el tiuj kiuj lernis Esperanton por paroli kun vi mem? Ĉu vi ne scias ke unu el la plej agrablaj flankoj de nia Internacia Lingvo estas havi la plezuron uzi ĝin kun aliaj homoj? Ĉu vi ne revas uzi la lingvon kun aliaj samideanoj? Ĉu vi ne ŝatas konatiĝi kun aliaj homoj, speciale kun tiuj alvenintaj el aliaj landoj? Malofte dum la jaro ni havas eblecon paroli Esperanton vidalvide kun aliaj samideanoj. Nun ni havas la eblecon. Kie? En Malago, dum la hispana kongreso. Ne restu hejme. Iru al Malago. Ĝuu la etoson. Plibonigu vian konon de nia lingvo, aŭ helpu plibonigi tiun de aliaj.

La organizantoj de la kongreso preparas por ni belan programon, en bela loko. Ne multaj esperantistoj el la tuta mondo havos tiun belan eblecon. Ĉu vi ankoraŭ hezitas iri al Malago? Ne malprofitu la eblecon.

Mi jam antaŭĝuas mian partoprenon. Denove mi renkontiĝos kun miaj malnovaj amikoj. Babilados senĉese en Esperanto. Konatiĝos kun novaj samideanoj. Lernos de ili.

Samideano kiu ne klopodas renkontiĝi kun aliaj eble estas samlingvano, sed ne samideano.

Venu al la kongreso. Ĉiuj atendas vin. Ĝis la kongreso: Augusto

### **HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (ne oficiale)**

La kolekto de ĵurnal-tondaĵoj pri esperanto kiun havas HEF estis skanita de Lupe Sanz kaj jam estas konsultebla en la paĝaro de HEF.

Ene de la komerca programo de la Urbodoma Palaco pri Kongresoj de la Madrida Urbodomo, HEF ricevis inviton por organizi ontan UKn en Madrido.

La kotizo de HEF denove estas deduktebla en la IRPF. La kvanto dependas de la Aŭtonomio. En Madrido estas 7 eŭroj.

### **VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas **ĉiulunde**, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3<sup>o</sup>-7 Tel. 91 446 80 79.

Juan del Castillo gvidos konversacian rondon la **1an de junio**, je la 18,30h. Oni esperas ĉeeston de Lorenzo Noguera, prezidanto de la grupo "Frateco" de Zaragoza.

15an de junio. "Madridaj palacoj"

---

### **ESPERANTO LICEO DE MADRID**

Asociación de Utilidad Pública Municipal  
San Alejandro 6- 4<sup>o</sup>B EXT  
28005 Madrid

**Eble la plej longa citaĵo pri esperanto en libroj**

"Homebody/Kabul" "En casa/en Kabul" de Tony Kushner, tradukita de Carla Matteini. Teatro Español. 2008. ISBN 978-84-87744-42-6

Du londonanoj, patro kaj filino, iras al Kabulo (Afganistano) por trovi la patrinon. Talibano, kiu lernis esperanton en malliberulejo, petas al Priscilla porti, por londona esperantisto, esperantajn poemojn. Ŝi havas problemon en la landlimo ĉar la polico, kiu ne konas esperanton, kredas ke la esperantaj tekstoj estas ĉifrita mesaĝo.

La hispana versio de la verko havas kelkajn erarojn rilate la supersignojn kaj akuzativo. La libro, aparte de la teatraĵo mem, inkludas glosaron, diversajn artikolojn pri Afganistano kaj ankaŭ esperantajn poemojn kiujn Teatro Español petis al Hispana Esperanto Federacio.

## ARTIKOLOJ

Paĝo 113: Poemoj esperanto/hispana. Rima VII de G.A: Bécquer. Zoe kaj Natemoj de la libro "Saturno" de Jorge Camacho

## GLOSARO

Paĝo 123: Esperanto: El esperanto es una lengua internacional desarrollada con el objetivo de servir de medio de comunicación, por encima de las diferentes culturas, con una característica distintiva: su neutralidad, la ausencia de privilegios para los hablantes de un idioma nacional concreto. El inicio del idioma se sitúa en 1887, con la publicación de la primera gramática en ruso por parte del médico polaco Lázaro Zamenhof. El esperanto se caracteriza por una gramática de tipo indoeuropeo, aunque más sencilla que la de los idiomas de esta familia, ya que carece de excepciones, y dispone de un sistema de conjugaciones y declinaciones relativamente poco complicado. La formación de las palabras se consigue mediante un sistema de composición de tipo aglutinante, con un conjunto bastante desarrollado de prefijos y sufijos. Las raíces se toman de los idiomas europeos más difundidos (con una presencia muy elevada del latín), lo que ha llevado a algunas personas a afirmar erróneamente que se trata de una mezcla de idiomas. En realidad, no lo es más que cualquier otro lenguaje desarrollado, como el castellano. Ludwik Lejzer Zamenhof (Bialystok, 15 de diciembre de 1859.-14 de abril de 1917) era un médico oftalmólogo, con un talento especial para las lenguas. Hablaba tres de forma fluida -ruso, polaco y alemán-, podía leer tres sin dificultad -latín, hebreo y francés- y además dominaba el judeo-alemán (yidish), que estudió durante dos años y sobre el que elaboró una gramática completa. De griego, inglés, italiano y otras lenguas, tenía sólo un conocimiento básico. Pero siempre consideró el ruso como su lengua materna: sólo en ella y en esperanto escribió poesía. A principios de 1898 se instaló definitivamente en el barrio judío de Varsovia, donde ejerció hasta su muerte, el 14 de abril de 1917, con el seudónimo de Doktoro Esperanto, que en español sería Doctor Esperanza.

## VERKO

Paĝo 179. KHAWAJA.- (A Priscila, en esperanto) Cu vi parolas Esperanto? PRISCILLA.- ¿Qué?. KHAWAJA.- ¿Esperanto?....

Paño 189. PRISCILLA.- Escribir poesía en un idioma de verdad debe ser bastante duro; así que la poesía en esperanto me parece... una estupidez. KHAWAJA.- Es un lenguaje que no tiene historia, y por tanto ninguna historia de opresión..... PRISCILLA.- ¿Y el esperanto?

Paño 190.- KHAWAJA.- ...Me dijo que sabía algo mucho mejor que el inglés: un idioma internacional, hablado en todos los países del mundo. ¡Nunca había oído hablar de semejante maravilla! Cuando mi compañero de celda era joven y libre, en los cosmopolitas años 30 del antiguo Amanullah Kahn, los kabulís eran más sofisticados, y mi compañero de celda aprendió esperanto ¿Quién no querría aprender a hablar el idioma del mundo? Era un buen profesor, un hombre bueno y paciente... a veces aún sueño con él. Por desgracia se equivocaba en una cosa: quizás en 1937 el mundo había aprendido esperanto, pero en 1986, cuando llegué a Londres, hablando sólo dari, pasto y esperanto, nadie me entendía. Yo había escrito 300 poemas en la cárcel, todos en esperanto. Creo que tengo oído para su singular staccato musical, con su sistema regular de afijos unidos a raíces simples, connotando verbo, lugar, oposición... adoro su torpeza moderna e hiperracional. Para mi suena no universalmente doméstico, sino sin hogar, sin estado, un dialecto refugiado global: Sidante en la gardeno/ mi audis bruon./Vidante sin en la gardeno, mi vokis al si./Vokite, si tuj venis./ La tera estis tute kovrita de nego./ Sidante, atendente, mi audis bruon. Es bonito ¿verdad? Lo creó un judío polaco, Zamenhof. Creía que mientras no pudiéramos hablar entre nosotros una lengua madre que hiciera aflorar nuestra humanidad común, jamás se alcanzaría la paz. Cuando escribo en esperanto, me siento transportado a un tiempo en que algo como un sueño de paz universal no parecía de entrada una locura. Y ni siquiera las noticias de que todavía otro niño ha pisado una mina o se ha visto envuelto en un fuego cruzado puede disipar sus sonidos como arrullos de paloma. Me siento impulsado a componer otro lamento, en esperanto, otro himno de paz...

Paño 245 MILTON.- (Interrumpiendo a PRISCILLA) ¿Qué poemas?. PRISCILLA.- ¡Están en esperanto, mierda, no le sirven a nadie! MILTON.- ¿De qué hablas? ¿Poesía en esperanto? ¿Por qué tienes...? PRISCILLA.- Me los dieron ..... MULAH.- Usted conoce este...espre... ¿Cómo lo llama? PRISCILLA.- Es... ¿Qué más da? Esperanto... ¿Dios mío esto es absurdo! MULAH.- ¿Usted habla ese...esperanto? PRISCILLA.- (Al tiempo con MILTON) Si, claro. MILTON.- (Al tiempo con PRISCILLA) Claro que no. Nadie lo habla. MULAH (A PRISCILLA) Háblelo, por favor (PRISCILLA calla) MILTON.- Nadie lo habla ya. Me gustaría realmente saber de qué va esto